
# NIA  PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
J.Miguel García Iturrioz
(jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna: 20 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**APRILO/JUNIO 2019** **Nro. 119 (2/19)**

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 31 de mayo, a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

**Orden del día**:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior (18/05/2018).
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2018.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2019.
4. Informaciones varias.
5. Ruegos y preguntas.

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel vi povas hispane legi ĉi-supre, la **vendredon 31-an de majo, je la 19,30 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

**TAGORDO**:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokolo de la lasta kunveno (18/05/2018).
2. Same pri la spezoj de la jaro 2018.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2019.
4. Diversaj sciigoj.
5. Proponoj kaj sugestoj.

**LOKE ...**

## FORPASIS.


Q. E. P. D.

**Don Augusto Ugalde Lázaro**

Falleció en Bilbao, el día 3 de abril de 2019, a los 96 años de edad, habiendo recibido los SS. SS. y la B. A. de S. S.

La pasintan 3-an de aprilo mortis en Bilbao nia kara amiko Augusto Ugalde. Veterana esperantisto, ano de la nuna Grupo de Bilbao preskaŭ ekde ĝia ekiro post la milito, li membriĝis la 1-an de marto 1955. Malgraŭ lia aĝo li ĉiujare vizitis nin antaŭ kristnasko por aĉeti loterion. Ni bone memoras lian lastan viziton, fine de novembro, kaj kore bedaŭras lian forpason. Forpasis ege bonkora homo. Ke li pace ripozu.


GOIAN BEGO

**Txomin Solabarrieta Etxaburu jauna**

Bilbon hil zen, 2019ko apirilaren 18an, 91 urte zituela, Eleizakoak eta Aita Santuaren Bedeinkazioa hartu ondoren.

Kaj la 18-an de aprilo forpasis nia amiko Txomin Solabarrieta. Eksa membro de Euskaltzaindia (Akademio pri vaska lingvo), li ne iĝis membro de nia Grupo sed partoprenis kurson kun grandaj scivolemo kaj entuziasmo, helpis nin kaj neniam perdis kontaktfadenon kun ni. Por ĉiam li restos en nia memoro.

## VIZITIS NIN …



La 12an de aprilo vizitis nin **<u>Miguel Gutiérrez Adúriz</u>**. Li eniris la ejon kie disvolviĝas la nuna kurso kaj helpis en la instruado.
Sur la maldekstra foto aperas Miguel inter la gelernantoj de la kurso.

Poste, kelkaj el ili vizitis restoracion ene de la malnova kvartalo de Bilbao kaj gustumis vespermanĝon en alloga kaj amika etoso.



LOKE ...

## NE FORGESU!!!




**La 31-an de majo, ĝenerala kunveno de la E-Grupo de Bilbao. 19:30 h.**

## GRUPANOJ EN LA HISPANA KONGRESO DE MALAGO.



Inter la 1-a kaj 5-a de majo disvolviĝis la ĉi-jara hispana kongreso en Malago.
Ĉu pro la dato ĉu pro malproksimeco, nur du membroj de nia Grupo partoprenis ĝin: José Ignacio Orejas kaj Jesús Miguel García.
Sur la foto, Jesús pozas apud Toño del Barrio, Prezidanto de HEF, la kanaria esperantisto Echedey kaj la meksikanino Mallely.

## Venontaj E-aranĝoj.

| | |
|---|---|
| 13-20 jul. | 52-a ILEI-kongreso. Ĉaĉak-Serbio. |
| 14-20 jul. | Ekskurso tra la tri baltaj landoj kaj veno grupe al UK. |
| 20-27 jul. | 104-UK (Universala Kongreso). Lahtio – Finlando. |
| 28 jul.-04 aŭg. | 75-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Liptovský Hrádok, Slovakio |
| 04-11 aŭg. | 92-a SAT-Kongreso. Barcelono. |
| 21-27 dec. | 7-a Afrika Kongreso de Esperanto. Buĵumburo, Burundo. |
| 27 dec. – 03 jan. | Junulara E-Semajno. Głuchołazy, Pollando. |
| 11-18 jul. 2020. | 76-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Someren (Nederlando). |
| 01-08 aŭg. 2020. | 105-UK (Universala Kongreso). Montrealo (Kanado). |

Pliaj informoj pri E-aranĝoj en: http://www.eventoj.hu/

**H.E.F.**

## ESPERANTO EN LA JARA KUNVENO DE SERVAS-HISPANIO.

Esperanto estos la speciala invitito de la jara kunveno kiun la asocio SERVAS, dediĉita al la instigado al la paco per vojaĝo kaj gastigado, celebris naciskale en la urbo Salamanko, inter la 4a kaj 7a de aprilo.

Dum tiuj tagoj eblis viziti ekspozicion pri Esperanto en la sidejo, kaj la 6an, sabate vespere, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegis pri la internacia lingvo.


La nomo SERVAS devenas ĝuste el Esperanto, kaj ekzistas klaraj konverĝoj en la historio kaj celoj de ambaŭ movadoj. Ni esperas ke tiu ĉi estos okazo por ligi pli daŭrajn kontaktojn inter ambaŭ movadoj.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 55. Apr. 2019)*

## ESPERANTO KAJ LA RIFUĜINTOJ DE LA UNUA MONDMILITO.




Eniris la Provincan Arkivon de Zaragozo ampleksa dokumentaro de la familio Gastón Ugarte. Inter ili troviĝas materialo rilata al la aktivado de Emilio Gastón favore al la disvastigo de Esperanto, kaj ankaŭ al la aktivado por gastigo de aŭstraj infanoj en esperantistaj familioj de Hispanio post la fino de la Unua Mondmilito.




Emilio Gastón estis unu el la pioniroj de Esperanto en Hispanio, kunfondinto de la esperantista grupo de Zaragozo "Frateco" kaj kunordiganto de multnombraj aktivadoj, inter kiuj elstaras tiu solidara gastigado, organizita kune kun la aŭstraj esperantistoj, en momento de granda mizero en tiu lando post la fino de la Milito.

Pri tiu epizodo ni ankaŭ povas mencii la ĵusan aperon de libro pri la aktivado en la valencia regiono, verkita de historiisto el urbo Cheste, José Vicente Castillo, kun titolo "Los trenes de la esperanza" ("La trajnoj de la espero")

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 55. Apr. 2019)*

## TAGO DE LA LIBRO KAJ LEGADO DE "DON KIĤOTO".

Esperanto denove rolis dum la sinsekva kompleta legado de la verko "Don Quijote de La Mancha" en la "Círculo de Bellas Artes", okaze de la Tago de la Libro. Peru kaj Manolo legis du pecojn de tiu verko en Esperanto la merkredon 24an de aprilo.

*("Nia Voĉo", órgano de Madrida E-Liceo. Majo 2019)*

**H.E.F.**

## Ĉi-jare la hispana kongreso veturis en Marokon.



Tetouan Marruecos 2019

Tuj finiĝantaj la hispana kaj IFEF-kongresoj, kelkaj el la kongresanoj (46) veturis en Afrikon, al Maroko, lando kiu situas nur 14 km. sude de Hispanio.

El Malago, hispana urbo kie disvolviĝis triopa kongreso – andaluzia, hispana kaj IFEF-a – ili veturis per buso al urbo Algeciras, kie atendis pramo por transiri la markolon Gibraltar kaj atingi la afrikan hispanan urbon Ceuta. De tie, per alia buso kaj longa atendado por eniri Marokon, la esperantistoj alvenis al Tetouan, kie troviĝis la hotelo.

En postaj tagoj oni visitis Asilah, Tanger kaj Chaouen ene de gaja esperantista etoso inter homoj el pli ol dek diversaj naciecoj.

Jam revene al Hispanio, antau transiri la marokan landlimon, ni eĉ havis la okazon travivi incidenton tre oftan en tiu ekstera landlimo de EU: du junaj marokanoj klopodis alkroĉiĝi de la suba parto de la buso por kaŝe eniri Hispanion kaj, sekve, EU-n. La ŝoforo rapide reagis per bato de la bussonorilo, tuj alvenis policistoj kaj la knaboj tuj foriris.

Neforgesebla vojaĝo pri kiu ni kore gratulas la organizantojn.

# TRA LA MONDO …

## tubaro en uea.facila.org

Iom post iom tubaro plipopulariĝas. Jen artikoleto pri ĝi ĉe facila.org:

https://uea.facila..org/artikoloj/tra-la-reto/tubaro-kolektujo-de-filmoj/

*(Pablo Busto. 08/04/2019)*

## ESPERANTO PROPONITA POR NEMATERIA KULTURA HEREDAĴO ANKAŬ EN SLOVAKIO.

La 29an de marto 2019 sendis SKEF (Slovakia Esperanto-Federacio) oficialan proponen al sia nacia instituto (apartenanta sub la Ministerio de kulturo) por enskribi Esperanton ene de la slovaka listo de la nemateria kultura heredaĵo.

La titolo de la propono estas: „Jazyk esperanto -nositeľ slovenskej a esperantskej kultúry“ (Lingvo esperanto -portilo de la slovaka kaj Esperanta kulturoj).

La proponon akceptis kaj ties forsendo subskribis krom SKEF ankaŭ ĉiuj lokaj kluboj kaj organizoj kaj samtempe la junulara SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo). Nun sekvos la procezo, dum kiu oni detale esploros la proponon, eventuale faros pliajn demandojn, postulos pliajn dokumentojn ktp.

Fine de la jaro 2019 oni devus informi pri la akcepto, eventuale malakcepto de la propono. La proponon jam anticipe subtenis kelkaj gravaj slovakaj politikistoj, restas tamen nur esperi, ke la propono estu pozitive taksita kaj de la pritaksantoj, kaj de la ministrino de kulturo mem (kiu havas finan, decidan voĉon).

Se Slovakio sukcesus, temus jam pri la tria lando (post Pollando kaj Kroatio), kie Esperanto estus tiel ĉi agnoskita –kaj tio jam donus rekte la eblon, proponi Esperanton kiel mondan heredaĵon de UNESKO! Tio jam estus vere granda atingo, nepre indas provi ĝin kaj esperi pri ties sukceso! Ŝajne okazas preparoj ankaŭ en Litovio, por simile proponi Esperanton kiel kultura heredaĵo ene de sia lando.

*(Peter Baláž (Petro), SKEF-prezidanto. Eŭropa Bulteno, marto2019, No 190)*

## TEJO ĈE UN JUNULARA FORUMO.

Komence de aprilo ekis en Novjorko la 8a EKOSOK, Junulara Forumo ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN).

Jam de kvar jaroj TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) aktive partoprenas en ĝi, kaj kontribuas en la rilatoj kun UN kaj en la gvidado de IKRJO - kunordigorgano por regionkontinentaj junularaj platformoj kaj por tutmondaj junularaj organizaĵoj. Ĉi jare estos aparta jaro: TEJO ne nur partoprenos en la forumo, sed la ĉefparolanto por la junularo dum la Fermo de la Forumo estos Rakoen Maertens.

Tio estas tre grava rekono por nia movado, por la agado de TEJO ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj por la kvalito de niaj aktivuloj.Estas ĵus konfirmite ke la Ĝenerala Sekretario de UN partoprenos en la Ferma Ceremonio de la Forumo -ĝuste kiam Rakoen alparolos la ĉeestantojn.

*(Francesco Maurelli, vicprezidantode TEJO. Eŭropa Bulteno, marto2019, No 190)*

## TRA LA MONDO …

## EVENTA SERVO.

Temas pri servo por montri eventojn rilatajn al Esperanto, ne nur kongresojn (kiel jam ekzistas aliaj), sed ankaŭ pli modestajn, kiel kunvenojn de kluboj, prelegojn, festojn, ktp.

La pli simpla adreso estas: https://eventaservo.org/ (flanka noto: pli bone ne sendu la "voston" de la retadresoj, kiuj ĝenerale taŭgas por kontroli la fonton, por komercaj celoj).

Oni petis, ke ni disvastigu kaj ke ni invitu aldoni eventojn okazontajn en Hispanio, ĉar nun tie https://eventaservo.org/Eŭropo/Hispanio nur troviĝas la kongresoj de Malago kaj de SAT. Simple kreu konton aŭ sendu al la prizorgantoj (aŭ sendu al HEF, kiu jam havas konton, ĉe info@esperanto.es).

*(José Antonio del Barrio. 12/02/2019)*

## Du kandidatoj por la prezidanteco de UEA

En aŭgusto finiĝos la dua trijara mandatperiodo de Mark Fettes kiel prezidanto de UEA. Tri personoj proponis sin por transpreni la taskon, dum ses personoj, kiujn kontaktis la elekta komisiono, malakceptis. La plej verda el la sinproponintoj ĝis nun ne ricevis subtenon de komitatanoj.

Limdato por kandidati por la posteno de prezidanto estis la 31-a de marto. Kiel la unua sendis sian kandidatiĝon Adalberto Soczówka, kiun la plej multaj kongresemaj esperantistoj rekonas pro liaj tutverdaj vestaĵoj. Li tamen ne havas aliajn konatajn movadajn meritojn, kaj ĝis nun ne ricevis la bezonatan subtenon de du komitatanoj de UEA, do lia kandidatiĝo almenaŭ ĉi-momente ne estas valida.

Laŭ komuniko de la elekta komisiono, jam dum la kongreso en Lisbono estis kontaktitaj tri potencialaj kandidatoj, kiuj tamen malakceptis la taskon. Pliaj tri personoj estis kontaktitaj poste, sed same malakceptis. Tial en la komenco de marto la elekta komisiono faris malferman alvokon.

Ĝis la limdato venis du pliaj kandidatoj, kun valida subteno de komitatanoj. *Duncan Charters* kaj Fernando Maia.


*("Libera Folio". 14/04/2019)*

## Kelkaj vortoj denaske Esperantaj.

Kabei Subite forlasi la E-movadon (kiel faris **Ka**zimierz **Be**in).
Krokodili Paroli en la gepatra lingvo de la ĉeestantoj dum kunveno de esperantistoj.
Aligatori Paroli nek en Esperanto nek en lingvo gepatra, sed en la gepatra lingvo de aliaj, dum kunveno de esperantistoj.
Malĉu De tempo al tempo uzata kiel ŝercdemando: "Ĉu aŭ malĉu?"
Maltrinki Pisi.
Salaton! Ŝerce uzata anstataŭ "saluton", ĉefe inter vegetaranoj.
Volapukaĵo Io stulta kaj nekomprenebla.
Mojosa Formita kun la komencliteroj de **M**oderna, **J**una, **S**tila.

*(Prenita el interreto)*

## IOM DA HISTORIO.




Jen tiu-ĉi artikolo kiu troviĝas en:
http://mareometro.blogspot.com/2018/04/portugalete-entre-los-pioneros-en-el.html. *("El mareómetro" estas loka revuo de Portugalete kiu okupiĝas pri la historio de la urbo*).

**PORTUGALETE ENTRE LOS PIONEROS EN EL NACIMIENTO DEL ESPERANTO EN EL PAIS VASCO**

El esperanto es un idioma artificial internacional, una segunda lengua de comunicación después de la lengua nativa del hablante, que nació a finales de la década de 1870 ideado en Polonia por el médico Dr. Zamenhof. No tardó en extenderse entre los distintos círculos sociales, ideológicos y religiosos de toda Europa, celebrando su primer Congreso Universal de Esperanto en Francia en 1905.

En 1903 ya se había creado la Sociedad Española para la Propaganda del Esperanto y en el País Vasco, dadas las componentes ideológicas que la acogieron, no es de extrañar que en el año 1905 se fundara en Sestao, en un ámbito eminentemente obrero, la sociedad esperantista "Fido, scienco kaj tradicio", y a continuación se crearon en Bilbao, Portugalete y San Sebastián.

Nuestro amigo y colaborador **Fernando L. de Lerena**, nos ha enviado al respecto un anuario esperantista publicada en 1907 con todas las agrupaciones que entonces tenía en España.

Bajo estas líneas hemos recogido en un cuadro todos los portugalujos que apoyaban y estudiaban en nuevo idioma, en el que aparecen casi un centenar de nombres.

Parece ser que la sede estaba en el Colegio de Santo Tomás, que se había establecido en la Villa en 1893, a instancias de Eduardo Vallejo Besga, Licenciado en ciencias físico-químicas, y otros "ilustrados profesores adornados de títulos académicos", como su hermano Francisco que era el Presidente del Grupo Esperantista, con Ruperto Medina de vicepresidente y con el ingeniero Enrique Retuerto y Miguel Carranza, como portavoces.

Vemos que entre los componentes que formaban parte del naciente movimiento, figuraban abogados como Plácido Careaga o Miguel Loredo, farmacéuticos como Elías López Bustamante, pintores, comerciantes, médicos como Juan José Conde Pelayo, muchos profesores y estudiantes de Comercio, etc.

La importancia de este movimiento en la Villa hizo que Juan Antonio Zunzunegui, lo incluyera en el paisaje portugalujo que nos pintó en su novela El barco de la muerte, con personajes pintorescos como Bernardón de quien se podía decir jocosamente en el pueblo que "era el máximo pontífice del esperantismo de Vizcaya".

Si hemos encabezado esta entrada con dos carteles de Congresos Esperantistas del siglo XX en Bilbao recogiendo la imagen del Puente Colgante, junto con el citado anuario de 1907, tendríamos que reconocer que en la actualidad podemos conocer pocos portugalujos que lo sepan, como puede ser nuestro compañero Roberto Hernández Gallejones, que entre los muchos idiomas que domina está este que nos ocupa.

(*Kiel vi povas legi, estas kelkaj asertoj diskutindaj. Ni reagos, ĉar estas loko por tio en la retejo, kaj klarigos kelkajn aferojn*).